

## 23 oficialaj lingvoj kaj 1 EU-komisaro

Ekde januaro 2007 Eŭropa Unio, por la unua fojo, dungis kaj “laborigas” komisaron por multlingveco/plurlingveco. Ĉu temas pri interna posten-ŝakrado aŭ pri unua ĝermo – eble eĉ komenco – de estonta EU-lingvo-politiko? S-ro *Leonard Orban* estas en malfacila situacio. La politikisto “el la dua linio” devis – dum la prezentadoparolado antaŭ la EU-parlamento – deklari, kial la rumana registaro ĝuste lin sendis al Bruselo kiel unuan komisaron de sia lando. Kaj li devas ĝustigi ion, pri kio li ne respondecas: ĉar la prezidanto de la komisiono *Barroso* asignis al li la novprojektitan laborkampon “multlingveco”. Dum “publika aŭskultado” (angle: “*Hearing*”) kritikemaj deputitoj lin certe demandos, ĉu tiu ĉi embarasa posteno valoras monatan salajron de 18 233 eŭroj.

S-ro *Orban* respondecos pri la 3500 tradukistoj kaj interpretistoj de EU, kiu ekde la 1-a de januaro 2007 havas 23 oficialajn lingvojn. Krom la lingvoj rumana kaj bulgara<sup>1</sup> ankaŭ la gaela aldoniĝis, ĉar irlandaj naciistoj postulis tion. Kalkulistoj tuj eltrovis, ke la nombro de traduk-kombinoj en EU plialtiĝos de 380 al 506. Ĉar por tion majstri eĉ tutmonde ekzistas tro malmultaj interpretistoj, EU jam nuntempe pli kaj pli ofte sin helpas per t.n. “relajksaj lingvoj”. Dum tio, sveda parlamentano povas aŭdi la kontribuon de ekz. hispana kolego nur kun tre granda malfruiĝo, ĉar ties vortoj estos tradukataj en la svedan pere de la lingvoj angla aŭ franca. Ĉu la kontrolado kaj gardado de tiu ĉi armeo da lingvotradukantoj en Bruselo plenigos la tutan tagon de nova deĵorĉefo estas treege dubinde. S-ro *Barroso* lerte rebatis tiuspecajn kritikojn per tio, ke li deklaris la multlingvec-temon ‘strategia demando’ por la estonto de EU. “Unueco en diverseco” estas alia slogano, kiun *Barroso* ĉi-kuntekste ŝatas citi, kaj, kiel li plue diris, “la bona informo el Bruselo estas, ke multlingveco por EU ne estas problemo, sed ŝanco”.

Ĉar unueca lingvo devas resti utopio<sup>2</sup>, EU insiste admonas siajn civitanojn al multlingveco: ĉiu eŭropano devas krom sia patrina lingvo regi minimume du pliajn lingvojn – ĉio ĉi por progresigi la komunan identecon kaj moviĝemon ene de EU. Ĉirkaŭ 28% jam scipovas (laŭ propraj deklaroj) paroladi kun aliaj eŭropanoj en du fremdaj lingvoj. La nove desegnita EU-komisaro el Rumanio ankaŭ respondecas pri tiuspecaj lingvo-enketoj. Tamen eĉ li mem ne plenumas la laŭplanan normon de sia oficejo, ĉar – krom sian patrinan lingvon – li “parolas flue” nur la anglan.

(Fonto: *Neue Zürcher Zeitung*, 2006-11-26, p.7) – sa

<sup>1</sup> kaj kun tiu (post la greka) ankaŭ nova skribo, la kirila! <sup>2</sup> Ĉu vere?? (Rim. de la tradukinto)

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.

Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj

Laserkopiita: Aprilo 2007 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30,*

*DE - 37269 Eschwege/Germanio*

Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare

pagebla pere de via

a) landa peranto (resp. landa delegito)

aŭ rekte al

b) ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL): isae-z \*) *vd. sube*

IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF

t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la

germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*,

Germanio, kun indiko “ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z”

## Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	<i>Libroservo AEA</i> 143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.	<libroservo@esperanto.org.au>
Brazilo	<i>Brazila Esperanto-Ligo (BEL)</i> C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília	<bel@esperanto.org.br>
Britio	<i>S-ro David Kelso</i> 5, Craighenhill Rd., Kilncadzow GB – Carlisle, ML8 4QT	<davidekelso@yahoo.co.uk>
Finnlando	<i>S-ino Päivi Saarinen</i> Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo	<paivi.saarinen@iki.fi>
Irlando	<i>S-ino Joy Davies</i> 9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W	<noviresp@eircom.net>
Korea Resp.	<i>S-ro Cho Sung Ho</i> Biol.Fak.Inha Univ., KR Incheon 402-751	<shcho@inha.ac.kr>
Norvegio	<i>Eldonejo Esperanto</i> Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo	<hara-ryg@online.no>
Pollando	<i>S-ino Maria Majerczak</i> ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków	<mamajer@interia.pl>
Svedio	<i>S-ino Lisbeth Andréasson</i> Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby	<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>
Usono	<i>Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)</i> P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA	<elna@esperanto-us.org>

\*) **Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b)**

**(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu**

**sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**

*Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio*

*Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>*